# HEJS

JUNULARA SEKCIO

HISPANA ESPERANTO ★ FEDERACIO

REDAKTORO: Sro. J. M.ª SERRANO

Nro. 66 - 1970

Mercería, 7, 3.º - TARRAGONA (Hispanujo)




Dro. J. Kondor en Heidelberg
(Germanujo)

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## 26-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

### GRAZ AUSTRIO 8-15 Aug.

ADRESO. 26-a I.J.K. H einz Kovacic,Grazbachgasse 57
A-8010 GRAZ Austrio.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

### KOTIZOJ

| ĝis 21 | | ĝis 25 | | Pli aĝaj | | Prezoj en usonaj dolaroj |
|---|---|---|---|---|---|---|
| M | N | M | N | M | N | |
| 21 | 28 | 22 | 31 | 24 | 33 | ĝis 31 jan. |
| 24 | 31 | 26 | 35 | 28 | 37 | ĝis 30 apr. |
| 27 | 34 | 30 | 39 | 32 | 41 | ĝis 15 jul. |

"M" signifas INDIVIDUAJ MEMBROJ DE TEJO
"N " signifas N e estas Individuaj membroj de TEJO

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Aliĝontoj post la lasta limdato (15 jul.) pagos Aldonan nan administran kotizon de 2 dolaroj.

La kotizo enhavas kiel kutime ĉiujn kostojn de restado kaj de la programo krom sveniroj,alkoholajoj ktp.

Kaj la pago al jena konto: Sro Peter Peltzer
8olo Graz Austrio
Postcekkonto N -ro
152765

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

### LOKA KONGRESA KOMITATO

Prezidanto: Walter Woschit,23,studento de medicino
Vicprezidanto:D-ro Klaus Perko,28.oficisto
Sekretario: H einz Kovacic,24, studento de historio
Kasisto:Peter Peltzer,26,studento de fiziko
Programo: D-ro Hans Michael Maitzen,26,astronomo
Ekskurso: D-ro Georg Klingenberg,27,universitata asis.
Informado: H einz Kovacic

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## LERNEJO- EJO DE LA REVOLUCIO?

Ĉiu el ni dum sia vivo spertas lernejon. Elementan,mezan,altan,plenkreskulan,televidan,profesiigan,libertempan ktp ktp.
Lernejo estas loko ,kie oni aŭ devas aŭ povas akiri informojn.Por ni gejunuloj momente pli interesas tiuj lernejoj,kie oni DEVAS akiri informojn.
Temas do pri la lernejoj,kiujn konstruis la socio,en kiu ni vivas,por ni.
POR NI ?
Jes,por vi, gejunuloj,diras la socio.Ĉar nur per la trapaso de la lernejoj vi povos vivi en la socio.Ili estas la pordo al via propra ekzisto kiel matura ano de nia socio,ili donas la eksteran signon de via plenkresko kaj kapablo.
POR NI ?
Ĉu estas vera,kion diras la socio pri la lernejoj?
Fakte,la lernejoj estas la lokoj,kie oni post longaj jaroj da vicstarado finfine akiras la enir-bileton al la teatro de la vivo.En tiu teatro de la vivo,en kiu oni nur rajtas rigardi kaj ne partopreni,atendos nin finfine la sama spektaklo kiel jam antaŭ la pordo de la teatro:
Ĉiu emas gajni pli antaŭan lokon por si kaj tion li faras per tretado ,boksado,puŝado kontraŭ la apudulo:
Do,la lernejoj estas perfektaj preparilo j por kompreni la vivon?
En tiu senco certe .Sed .........Io ne funkcias tamen kun la lernejoj.Kial tiom da problemoj kun ili en la nuntempo,kial ĉiam pli granda diskuto pri ili?
Eble pro tio,ĉar kelekaj el tiuj ,kiuj devas vicstari ,forŝteliĝis iomete el la vico,por sekrete rigardi malantaŭ de la teatro,ILI vidis kaj vidas la reĝisorojn de la teatro de la vivo.ILI ekkonas,ke ne indas atendi je tiu teatraĉo,envere:fiteatro de la vivo.

Ili diras: LA LERNEJOJ NE ESTAS POR NI,ni protestas kontraŭ tiu teatro de la vivo.Ni protestas kontraŭ la trompo fare de la estroj de la teatro.
N i volas alian teatron! N i volasREVOLUCION DE LA TEATRO.N i volas teatron,en kiu ni rajtos ludi,ne nur spekti.N i ne volas atendi tiun teatron en vicstarado



-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o- -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Ni volas propran teatron,provteatron,en kiu ni nin trejnas por la granda teatro.Kaj finfine ni volas aliajn temojn el tiujn,kiujn oni konstante trudas al ni en la teatro de la vivo:Murdon,rabon,trompon, mensogon,kaj ekspluaton.
Ni volas la teatron de la NOVA HOMO,kaj tiu nova homo estas tiu kiu liberigis sin de la stato de... "Longhara simio" kaj kondukis sin al digna reganto kaj kreanto de la mondo.
N i volas la novan homon,kies vivo ne estas plena de agado,kie vere nur havas la celon forigi la konstantan,detruan enuon.Ni volas homon,kiu nek sin nek la aliajn trompas.
Ni volas homon,kies energio ne efikigas en agreso ,sed en kreo de ĝojo kaj feliĉo
Sed ĝuste por krei la novan homon ni bezonas novan teatron.Tial necesas ŝanĝo de la teatro,de la direktoroj,de la scena tekniko,de la formo de la teatro,de la sistemo de la enirprezoj.Kelkaj demandas:Kio restos de la teatro de la vivo? Restos,ne; estos io multe pli vasta,granda,envere homeca IO,kiu krevigis la malnovan kaj kreis novan dimension.
La dimension de la NOVA HOMO ,"el hombre nuevo" (Che Guevara).
Ni reiro de la bildo de la teatro al la nocio LERNEJO= Ĉiu el ni,kiu per vekaj okuloj rigardas kaj registras la movadon de la nuna mondo,spertis,ke la lernejo en la nuna formo ne sukcesadas krei tiun tipon de NOVA HOMO HOMO pri kiu revas la novaj ideologoj,kaj kiun malatendas la nunaj teknokratoj.

Necesas ŝanĝo.ŝanĝo fundamenta,ĉar nur sub la gvido de la ideo pri la NOVA HOMO ni sukcesos krei la bazan kondiĉon por la estiĝo de la NOVA HOMO ,kaj tiu baza kondiĉo estas la lernejo.
Ni scias,ke la lernejo estas ankaŭ loko de danĝero. Lernejo povas esti manipulilo de ajnaj,senksrupulaj interesoj.ĝi povas esti la unua kaj plej grava faktoro en la konservado de ajnaj sociaj sistemoj,ankaŭ de diktaturoj kaj tiranismoj.Lernejo estas tion danĝera,kiom la scio pri la nukleaj fortoj.Nia kapablo krei ion novan kaj bonan estas aŭtomate akompanata de la ebleco al kreo de malbono,detruo kaj perforto.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

Ĝuste tial ni pli urĝe ol iam bezonas la NOVAN HOMON,ĉar nur li scios regi la novajn danĝerojn,ĉar nur li serĉos-kaj trovos sian feliĉon en konsciiĝo pri la tuto,pri la kosmo,pri la universalo kaj pri si mem.

La bazo por tio estas la NOVA LERNEJO.Ĝuste pro la multpromesa,admirinda kaj sekvinda paŝo,kiun faris Tutmonda Esperantista Junulara Organizo okaze de la 25-a Internacia Junulara Kongreso,la Loka Kongreso Komitato de la 26-a Internacia Junulara Kongreso en Graz elektis la temon:

JUNULARO KAJ LERNEJO

Ĝi opinias ke la komenco de konsciigo de TEJO rilate la novaj dimensioj de ĝia agado por Esperanto devas trovi nepran daŭrigon en la sekvanta I=J=K.Ĝi devas daŭrigi per tio,ke ni junaj esperantistoj okupiĝas pri unu el la bazaj homaj kaj sociaj institucioj,kiu do baze influas al la koncepto pri la homo-pozitive kaj negative-kaj tio estas la lernejo.

Ni havos en Graz la perfektan ŝancon konkretigi niajn ideojn je tre konkreta objekto,t.e. la lernejaj sistemoj de niaj landoj.Ni povos havi unuarangan interŝanĝon de informado pri la situacioj de la edukado en niaj landoj kaj kompari ilin.

Sed due,pli grave ni povas esplori,kio en iaj lernejoj harmonias kun la koncepto de la NOVA HOMO,kaj tio nete malhelpas la estiĝonde la NOVA HOMO.

Dum la jaro ni klopodos jam antaŭdiskuti tiun problemon en KONTAKTO kaj ni instigas ĉiujn organizantojn de Esperantorenkontiĝoj dediĉi parton al diskuto pri tiu problemaro.

NNi deziregas,ke la diskutoj estas afero de ĉiuj ĉar ĉifoje vere ĉio en iu formo estas koncernata kaj ĉiuj trovos la forumon,kie ili povos kontribui.

Anticipe ni proponas kelkajn temojn:

LERNEJO:
1) Loko de aŭtoritatismo?
2) distingilo de sociaj klasoj?
3) edukejo aŭ selekci-ejo?
4) ĝisdata informado?
5) preparejo al demokratio?
6) por praktiko aŭ teorio?

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

Ĉiujn ni petas, ne heziti, tuj skribi al ni eventualajn proponojn pri aliaj temoj, eĉ eventualajn prelegontojn, kiu liveru bazan informadon por la koncernaj diskutoj.

La 26-a Internacia Junulara Kongreso en Graz montros, ĉu la nova vojo, kiun ekiris TEJO per la DEKLARACIO DE TYRESÖ, estas vojo en la estonteco, aŭ ĉu ĝi estis nur la paŝo de kelkaj. Ĝi estos loko. kie niaj novaj ideoj estos elprovataj en la konkreta rilato kaj traktado de konkreta temo.

Ĝi estos loga, entuziasmiga tasko, kiun donis al ni.

H.M. MAITZEN

!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!

Leganto, se la temoj proponitaj de S-ro H.M. Maitzen interesas al vi, instigu al la estraranoj de via grupo ke ili organizos, konferencon, aŭ diskutadon pri la LERNEJO. Se vi deziras proponi aliajn temojn pli bone, nur ni deziras ricevi multajn informojn pri viaj konkludoj kaj novaj ideoj.

Oni ankaŭ petas al ĉiuj Esperantaj grupoj utiligi iliajn informilojn publikigante la supran artikolon, tute aŭ parte tiamaniere ĉiuj la esperantistoj povos partopreni aktive en LA JARO DE INTERNACIA EDUKADO; PROPONANTE AL NI NOVAJN KONCEPTOJN PRI LA LERNEJO, EDUKADO, KULTURO K.C.

Ĉar nia deziro estas sendi al la 26-a IJK en Graz, taŭgan kaj konkretan rezolucion kaj konkludon de la Esperanta Movado en nia lando.

Tiel do sendu viajn demandojn kaj konsilojn kaj rezoluciojn al S-ro S. Aragay strato Bassegoda 40-3-1 Barcelono 14.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Ni rememoras al la HEJS-anoj de Barcelono ke en la sekvantaj sabataj kunsidoj en la KLUBO de Amikoj de la UNESKO (Esperanta Fako) Str. Lauria 12-1º ni onituj komencos taŭgajn dislutojn pri la temojn proponitaj de S-ro H.M. Maitzen. Nome de la Klubo kaj HEJS ni invitas vin ĉeesti kaj partopreni.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## RAPORTO PRI MIAJ FERIAJ TRAVIVAĴOJ EN CALELLA HISPANUJO

Dro. J. KONDOR (Germanujo)

Mi veturis ĉijare per moderna aŭtobuso de la vojaĝoficejo Gimmler el Wetzl ĉe la rivero Lahn.50 personoj estis kune kaj ni ĝojis precipe pro la moderna ekipaĵo de la aútobuso.

Veturante tra nia lando kaj Francujo ni atingis la francan-hispanan landlimon,ĉe Le Perthus,post Perpignan Ankaŭ ĉi tie okazis nenia privata kontrolo,nur la gvidanto montris la paperojn.Longe ni veturas tra la Pirineoj,majestaj montegoj,kie antaŭ dumiljaroj la punika Hanibalo marŝis kun siaj soldatoj kaj elefantoj kontraŭ la roma imperio....Ĝis Gerona,Flughavena urbo inter la Pirineoj kaj Barcelono,ni veturas tra monta regiono,kie ni ofte povis observi grandegajn reklamilojn apud la vojoj,sur la kamparo aŭ sur la montdeklivoj,kiuj anoncas kaj proponas plej diversajn varojn al la vizitantoj de la lando... Estis ankoraŭ tute hele,kiam ni ekvidis unuan fojon la maron Mediteranean!.Ni raviĝis de la belega bildo,kiun ĝi prezentis al ni ! Ĝi ŝajnis esti vere blua kaj ĝia senfineco kaptis nian koron.

Vespere.ĉ, la 20,30 horo,ni alvenis al Calella,kie jam atendis nin la pakaĵportistoj kun siaj ĉaretoj kaj tuj gvidis nin en nian hotelon VILA,kelkcentmetroj for de la haltejo.Tuj post ĉambropreno ni kolektiĝis en la manĝejo sube kaj ricevis abundan,bongustan vespermanĝon kun duonlitro da ruĝa vino po persono,kiu jam estis enkalkulita en la prezon.

En la ĉambro mia filino Bernadette konstatis unua ,ke la akvo el la kondukilo ne volas ŝaŭmi,se oni uzas la sapon.Mi volis lavi la dentojn per ĝi kaj tiam mi rimarkis,ke ĝi estas sala mara akvo.D Bedaŭrinde,tiu ĉi fakto sola iom malagrabligis nian restadon en Calella, sed alie la manĝaĵoj kaj la banado en la maro rekompencis nun multoble pro tiu ĉi manko.

La strando konsistas el pizformaj ŝtoneroj kaj en la sunbrilo apenaŭ oni povas sur ĝi nudpiede iradi.... Sunombrelo kaj aermatracoj estas nepre havendaj ĉi tie ,ĉe la maro,ĉar alie la restado tie ne estas granda ĝuo. Post banado estas proponenda duŝado,ĉar alie la salo de la mara akvo sekigas la haŭton kaj kaŭzas malagrablan senton.

-o-o-o-o-o-  -o-o-o-o-o-o-
-o-o-o-o-o- -o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Là hispanaj fruktovendistoj sur la strando,kun siaj korboj,apartenas al la tipa bildo de la ferioj. Ili estas tre ĉarmaj homoj,sed sufiĉe multekostaj, kvankam la fruktoj tie kreskas en abundo.Nature ne mankis tie ankaŭ la glacivendistoj kaj strandvestaĵvendistinoj.Ilia kutima kriado:Lali-lali,Go-go,(por glaciaĵo kaj kokoso) reeĥas eĉ nun en miaj oreloj.

(Privata konstato),la virinoj estas tre ĉarmaj,mildaj,kun belaj,grandaj,olivbrunaj okuloj, La amo al la infanoj ĉiupaŝe estas observebla.

En la butikoj oni povas aĉeti ĉion eblan precipe aron da rememoraĵoj kaj en gazetkioskoj la plej gravajn okcidentajn taggazetojn kaj revuojn.Pro la granda varmo post la tagmezo ĝis la 16-a ŝlosas la plej multaj butikoj siajn pordojn,sed en la vespero ili restas malfermitaj ĝis la 23-a, 24-a horo....

Tipa figuro de la strata bildo estas la azena viro,kiu forvendas desur la dorso de sia azeno potojn el argilo.kiujn ĝi portas per sia azeno,enstarigitaj en pajloamaso,kiun ŝnuroj kuntenas.

Sur la promenadejo,apud la maro,sub la platanoj,estas diversaj restaracioj,kie la kelneroj portas la bieron ankaŭ en dulitraj kruĉoj,eĉ en 10 litra glasotubo,el kiu trinkas la " Familio", unu post la alia,kiel faras la indianoj per sia pacopipo.

La 1 de aŭgusto,vendrede mi faris ekskurson kurson aŭtobuŝan al MONTSERRAT al la Sankta Monto kaj klostro de la benediktaj pastroj kaj pilgrimejo de multaj hispanoj.Ni veturis tra Mataro,pri kiu nia gvidanto rakontis,ke ĉi estas la unua urbo de Hispanujo ,kie oni konstruis unuan fojon fervojon. Li menciis ankoraŭ,ke la hispanaj fervojaj vagonaroj naroj ne povas senpere veturi tra la landlimo,ĉar la disr la distanco de la hispanaj relparoj estas la sama kiel Sovjetunio,do diferencas de la eŭropaj relparoj.Nur la Transeŭropa Ekspreso povas sen trakoŝanĝo traveturi la landlimon.

daŭros

-o=8=8=8=8=8=8--o-o-o-o-o-o-o-o-o-

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## 1970. ANY INTERNACIONAL DE L'EDUCACIÓ

## UN IL-LUSTRE PEDAGOG

Constituiria un oblit imperdonable,no esmentar en aquest Any Internacional de l"Educació,a un home que promogué,en la seva època,una gran revolució en el camp de l'ensenyament general.

Es tracta de Joan Amós Komenski (Comenius) pedagog,gramátic i filisof txec ,les obres del quál traduides a vuit idiomes occidentals i a quatre orientals reformaren totalment els métodes pedagógics en diverses nacions del nostre continent.

I el bo del cas,es que no solament iniciá un renaixement didáctic i docent arreu del món,sino que ensems va col-laborar-hi personalment en tots elsasaspectes ço que va donar-li un gran prestigi universal.

Fou una obra de gegant portada a terme grácies a la seva intel-ligéncia i esforç titánic en be del millorament cultural de la humanitat.No cal dir doncs, que bona part dels nous programes educatius de les nacions es deuen precisament a les seves idees revolucionáries que doná a coneixer en el seu temps.

Comenius va ocupar-se,de bon començ ,de la teoría de l'Educació,la qual va dividir en quatre époques ben característiques de sis anys cadascuna d'elles, es-a-dir:

1ª época -- Instrucció a cárrec de la mare

2ª " -- Ensenyament primari.

3ª " -- Estudis llatins.

4ª " -- Estudis netament universitaris.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-  -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

Com espot veure, per l`esbos abans esmentat, es va tractar d'una extraordinária i immensa reforma pedagógica de l'antigor, que va donar un fort i genial impuls a l'ensenyament de l'esdevenidor, capgirant, de fet, tots els sistemes utilitzats aleshores.

Dissortadament, fou en la época moderna quan es va copsar tota la importámcia pedagógica de la seva obra literaria i docent, bo i situant-lo en el lloc privilegiat que li pertocaba degut als seus mérits i entrega absoluta:

NNo solament fou un geni en el camp de la pedagogia universal, sinó que també era un convencut peoner de una llengua internacional necesária en el terreny de les relacions humanes per tal de que la cultura pogués ésser assimilada per tots els pobles.

Va néixer en 1592, i morí en 1670

Prof. JAUME ARAGAY
!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

CLUB D'AMICS DE LA UNESCO
Lauria 12 1er.

Sabate, la 18-an de aprilo je la 7,30 horo vespere

Nia aktiva samideano kaj Prof, Petro Nuez, prelegos en Esperanto pri la temo:

N I A L I T E R A T U R O

Ni tutkore invitas ĉiujn gesamideanojn kaj geamikojn.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
AKTIVA ESPERANTISTO estas membro de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

## JUNULARA SORTO -ĈU MORTO AŬ FORTO ?

Tute rekte dirita: ĉi tiu artikolo celas memorigi vin pri la ekzisto de TEJO,de la esperantista junularo, kaj konvinki vin ke vi devas ĝin apogi.

Se vi nun eklegis ĉi tiun duan alineon,vi do evidente ne estas indeferenta al la temo,kaj interesiĝas pri la sorto de TEJO.Kompostisto atentu:temas pri "sorto" ne "morto".

Tiurilate,tute ne temas pri morto.Pli taŭgus la eraro "forto".Generale,la esperantista junularo fortiĝas ĝia membraro kreskis ĝis pli ol 12.000.la nombro de la landaj sekcioj kreskis al 23 (malgraŭ likvido de la svi ĝia pasintsomera kongreso en Svedujo estis unu el la plej laborefikaj,ĝia agado pli kaj pli inspiras fidon.

Tiu tuta tendeco de plifortiĝo tamen similas al kreko de planto per folioj,floroj,sed sen sufiĉaj radikoj. La radikoj,la bazoj por la agado,konsistus el sufiĉe granda kerno de individuaj,proksimaj,interesiĝantaj membroj de UEA/TEJO kaj la nombro daŭre falas.

Eble jam pli ofte vi legis klarigojn pri tiu situacio,ekzistanta depost la jaro 1965.Tial ĉi-foje ni ne longe klarigos,kaj nur certigas al vi,ke la esperantista junularo finance alproksimiĝas al krizo.Pli konkrete:al morto,laŭ la supra vortludo.

La esperantista junularo ĝis nun ne sekvis la ekzemplon de siaj samaĝuloj.Kiam ili ne ricevis sufiĉan rekonon kaj apogon ili ne okupis la Centran Oficejon de UEA,ĵetis bombojn en la Universalkongresan inaŭguron,d nek devigis aviadilon kun kongreskaravano ŝanĝi sian vojon al la tegmenta teraso de la prezidanto de TEJO.Sed ŝajne iom post iom la tempo alproksimiĝas por tiaj iniciatoj.Nur tiam eble la esperantista kolektivo komprenos la neceson de individuiĝo,de individua membreco de TEJO/ UEA aŭ UEA/TEJO laŭelekte.

Proksimiĝas la tempo de krizo kaj de krizaj agoj. Samtempe,paradoĝe,TEJO proksimiĝas al floranta,vigla, multfaceta mondmovado.Tiu stranga kontraŭdiro povas ŝanĝiĝi favore nur se TEJO proksimiĝos al tria faktoro:al vi:Nur se granda kerno de individuaj,proksimaj,interesiĝantaj membroj vivas kun TEJO kaj en TEJO,nur tiam TEJO povas plifortiĝi.

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

Vi,tio estas unuavice la junaj esperantistoj ĝis 25-jaraj,kiuj enviciĝu en la membrokategoriojn JMA kaj MA-K (22,50 kaj 30 gld. respektive kiel jarkotizo).Per tio vi ricevos "Kontakto"n kaj ĉiujn eldonaĵojn de UEA.

Kaj vi-tio estas ankaŭ la pli ol 25-jaruloj kiuj povas konkretigi sian subtenon per Patrona membreco (16 gld.jare,kun "Kontakto" kaj aliaj dokumentoj).

Krome ,la revuo "Kontakto" estas aprate abonebla sen membreco,sed prefere membriĝu.Abono kostas 5gld,por ĝis 25 jaruloj.8gdl.por pli aĝuloj "Kontakto" regule aperas,kaj estas administrata de la Centra Oficejo de UEA.La adreso por ĉiuj aliĝoj estas TEJO/UEA, Nieuwe Binnenweg 176,Rotterdam 2 Nederlando.

Hans Bakker

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## S O M E R O 1 9 7 0

### Internaciaj Labortendaroj

Se vi estas sufuĉe juna,bone scias Esperanton kaj interesiĝas pri kelksemajna instruado kaj laborado en labortendaraj (do sifiĉe primitivaj) kondiĉoj,bonvolu skribi kaj peti cirkuleron al la malsupra adreso.Ankaŭ lertuloj pri gitaro,ludoj, skeĉoj estas bezonata por vigligi la kursojn.

Adreso: Jeanne-Marie Lioville

6 rue Léon Vaudoye,Paris 7-a,

FRANCUJO.

P.s.:La landoj kie estos la labortendaroj estos verŝajne:Libano,Nederlando,Francujo,Turkujo,Italujo kaj Danlando.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o--

SAĜA VOJAĜANTO kunportas la Jarlibron de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!O!

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

DEZIRAS KORESPONDI

-Maria Dopierata,WARSZAWA.Al. Swierczewskiego 113 a m 12.Pollando.-Intereso j:Filmo,muziko,turismo.

-S-ro Paŭlo Dragula.Bul,Bucuresti 10/64, Bai Mare Rumanio.

-Fino.Ana Maria Lange.Trollebergsträgen 34 C,22232 Lund, Svedujo.

- S-ro Kriuljov Jurij, Gorjkij 105 Opernaja 29 kv 57 USSR.-Deziras korespondi kun filatelistoj.

- S-ro Vladimír Kostiha havas adresojn de gejunuloj en Ĉeĥoslovajio,kiuj deziras korespondi kun gejunuloj en Hispanujo pri diversaj temoj per diversaj lingvoj.Skribu al adreso:

S-ro Vladimir Kostiha,Františka Hajdy 2,
Ostrava-Hrabúvka,Ĉeĥoslovakio."

Bonvolu adresi la korespondpetojn al:

S-ro Josep Serrano.str. Mercería 7. Tarragona
Hispanujo.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Notas de secretaria:

Han abonado la cotización anual los siguientes consoci

Srtas. Magdalena Clerch y Maribel L. Desilanes.
Sres. Oscar Puig y Francisco Ruiz.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Recordamos a nuestros socios y simpatizantes de HEJS que la Residencia de Monistrol permanecerá abierta todo el verano desde los meses de Julio hasta finales de Agosto.Todas las personas interesadas en utilizar la Residencia,sea para dormir o solamente acampar les rogamos se pongan en contacto con el administrador Sr. S.Aragay C/Bassegoda 40-3-1 Barcelona para concretar sin prisas los detalles del alojamiento.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

C

MADERAS
CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24
BARCELONA (14)

jovani

instalación
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares, billarines, etc.

instalación sin ningún gasto para el cliente

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA
y
TEJEDORA
ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Teléf. 230 29 41
BARCELONA

VENDO RETALES

*para falda o pantalón*
*directos de fábrica*

J. Cardellach

C. Salvatierra, 99
TARRASA